# NAJBARA FOLIO

Redaktas kaj eldonas Klubo de Esperantistoj en Krzeszowice n-ro 2/2000


## INVITO AL KRZESZOWICE

Proksimiĝas somero kaj kun ĝi promenadsezono. Mi proponas al niaj simpatiaj gelegantoj por ke ili kiel eble plej rapide forlasu sufokan, veturildensan Krakovon kaj ekveturu en belegajn ĉirkaŭaĵojn de nia urbo. Facila akcesvojo per trajno (25 km) aŭ per buseto (str. Pawia kaj Krupnicza) instigas al la rapida decido. Tabuloj kun precizaj mapoj de perpiedaj kaj biciklaj turismaj vojoj, troviĝas en Krzeszowice en la PKP stacidomo, pli gravaj kruciĝoj kaj en la urbetcentro sur la rondplaco. Ili kondukas vin al la belegaj, ĵurasaj valetoj kiujn vi povas atingi post 5- 15 km de vojaĝo, egale ĉu piede, bicikle aŭ per loka buso. La valetoj kun certe konataj al vi nomoj: Eliaszówka, Racławki, Będkowska, Mnikowska, Bolechowicka, Kobylańska kuŝas en la strefo de landkonaj parkoj kaj iuj el ili ekz. Racławki, Eliaszówka apartenas al restrikte protektaj naciaj parkoj pro tute unika, riĉa floro kaj faŭno. Vi rigardos pitoreskajn kalkroketojn, profundajn kavernojn, vigle serpentantajn torentojn aŭ arbarajn rifuĝejojn kun sunumitaj florherbejoj.

Vere belegaj, foliaj kaj koniferaj arbaroj kiuj okupas 35 % de la tuta surfaco de nia komunumo certe helpos ripozi al via laca vidsenso kaj mildigos nervosistemon. En sekvontaj „ Najbaraj Folioj" ni klopodos priskribi la plej turisme atrakciajn vojojn, inter alie- al la Karmelitana Klostro en Czerna, al la kastelruinaĵoj en Rudno, al la Dulowa-arbarego. Ek al la busetoj kaj bicikloj!

Barbara Sułkowska



## KRONIKO

14.04. Okazis unua el la ciklo de renkontoj dediĉitaj al poezio esperanta. Ni okupiĝis pri la verkado de **Kazimierz Szczurek** el Cieszyn. La aŭtoro, filologo, bibliologo kaj publicisto ĉefe verkadis Esperante kaj tiu ĉi lingvo fariĝis lia ĉefa esprimilo. Krom poezio li okupiĝis pri prozo, verkante rakontojn kaj eseojn. „ Sopiro al puraj fontoj „ estis poeziaĵoj pri kiuj ni ĉefe okupiĝis dum la vespero. Bedaŭrinde la aŭtoro mortis en januaro kaj longe preparigita renkonto kun Li ne efektiviĝis.

27.04- 05.05. Ni gastigis en Krzeszowice la svedan esperantistinon **Kerstin Kristoferson**, kiu cetere aktive partoprenis la 30. E- Kongreson en Krakovo. Dum liberaj horoj ŝi vizitis la plej famajn krakovajn antikvaĵojn, preĝejojn kaj muzeojn. Ŝi donacis al ni la libron tradukitan pere de ŝi el la sveda al Esperanto „ Nova ĉielo, nova tero „. La libro priskribas famajn vitralojn el Skara- katedralo.

28.04- 03.05. Okazis la 30. jubilea, tutpollanda Kongreso de Esperanto. Kongresaj tagoj detale priskribis s-ano M.Kostecki en la 6. n-ro de „Apudvistula Bulteno".

26.05. La poezia vespero dediĉita al **Bogusław Sobol.** Legantoj de esperantista, enlanda kaj internacia gazetaro bone konas liajn versaĵojn. Du libretoj „ Montru al mi ĝustan vojon „ kaj „ En ĉiu homo vidu Dion „ decidis pri enhavo de la vespero.

30.05.-11.06. Okazis XXII Ĉebalta Esperantista Printempo en Mielno. S-ano **Zbigniew Duda** forveturis tie, por ke aktive ripozi.

08.06. Vizitis nin s-anino **Elżbieta Haręźlak** el Bielsko-Biała. Oni devas substreki, ke ŝi apartenas al la plej fidelaj simpatiantinoj de KSE inkluzive nian klubon.

18.06. Unuan fojon sed okope ni partoprenis en 75.renkonto de Esperantistoj en Ĉantorio. Ĉi jare partoprenis 58 personojn. Pri la renkonto pli precize informos nin Igor Wasilewski en la aparta artikoleto.

26.06 La poezian vesperon ni dediĉis al **Lidia Ligęza** . La aŭtorino, prezidantino de KSE estas nia la plej fama esperanta poetino. „ Aleo aŭtuna „ kaj „ Mia eno „ recititaj de la Aŭtorino vere kortuŝis la amantojn de la valora poezio. La vespero estis menciita per artikoleto en la loka „ Magazyn Krzeszowicki" n-ro 204.

23.06- 02.07. Vizitis nin **Sigita Staišiūnaitė** el Kaunas en Litovio. La ĉarma esperantistino okupiĝas pri Yumeiho- terapio. La sanigan agadon de Sigita spertis ne nur loka esperantistaro. Ni atendas senpacience ŝian venontjaran viziton.

29.06- 09.07. Triopo: **Anna Kołpanowicz, Teresa Mazur** kaj **Maria Ostrowska** forveturis al Baltiaj Esperanto Tagoj en Tallinn . Pri iliaj aventuroj en Estonio rakontos en aparta artikolo Maria Ostrowska.

## REMEMOROJ PRI MIELNO

Antaŭ nelonge [30. de majo – 11. de junio ] mi partoprenis la XXII-an Ĉebaltan Esperantistan Printempon en Mielno, dum kiu ni ĝuis kelkajn tagojn kun vere somera, suna vetero. La restadon mi rememoras tre agrable ne nur pro la bela vetero, grandiozaj strandoj kaj la ĉarmo de Mielno, sed antaŭ ĉio pro la interesa kaj riĉa E-programo, vere bone organizita de s-ano **Czesław Baranowski** . La tempo de la aranĝo estis ĝuste elektita antaŭ komenco de la turisma sezono kaj dank'al tio, krom malpli altaj restadkostoj, oni povis eviti homamason kaj uzi tute purajn strandojn. La aranĝon partoprenis 72 personojn. 47 – el Pollando, 14 – el Germanio, 4 – el Francio, 3 – el Britio, 2 – el Danlando , 1 – el Nederlando kaj 1 – el Bjelorusio. Interese aspektis selektado de kunloĝantoj. Mi loĝis kun mia amiko Polo kaj kun unu simpatia s-ano el Nederlando. Tiamaniere, dezirante interparoli, ni uzadis nur E-on, per kio ni perfektiĝis nian lingvoscion kaj limiĝis krokodiladon. La programo estis tre riĉa kaj ĉiu povis elekti por si ion interesan. Krom la lingvoperfektivado en 3 konversaciaj rondoj, okazis interesaj naciaj vesperoj, diversaj konkursoj, prezentadoj de poeziaĵoj kaj preskaŭ ĉiutaga, komuna kantado [ kiun bonege gvidis **Urszula Giercarz** ] ,dancvesperoj ktp. Oni povis partopreni du senpagajn busajn ekskursojn al Koszalin kaj al Kołobrzeg kaj tuttagan , aparte pagendan, al Slovina Nacia Parko. Venontjare mi ankaŭ intencas partopreni en ĈEP ĉar la tuta aranĝo estas tre vizitinda.

Zbigniew Duda